

JARO II.

N.º 22.ª *

LA SUNO HISPANA

Parolado de D-ro Zamenhof

ĉe la esperantista Kongreso de Boulonjo-sur-Maró

ESTIMATAJ SINJORINOJ KAJ SINJOROJ!

Mi salutas vin, karaj samideanoj, frattoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas (*aplaŭdado*). Mi salutas vin ankaŭ, glora lando Francujo kaj bela urbo Boulonjo-sur-Maró, kiuj bonvole oferis gastamon al nia kongreso. Mi esprimas ankaŭ koran dankon al tiuj personoj kaj institucioj en Parizo, kiuj ĉe mia trapaso tra tiu ĉi glora urbo esprimis sub mia adreso sian favoron por la afero Esperanto, nome al s-ro la Ministro de la Publika Instruado, al la urbestro de Parizo, al la franca Ligo de instruado kaj al multaj diversaj sciencaj eminentuloj (*aplaŭdado*).

Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis regnestroj nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono, ne bruas pafilejoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj

Discurso del Dr. Zamenhof

en el Congreso esperantista de Boulogne-sur-Mer

ESTIMADOS SEÑORAS Y CABALLEROS:

Yo os saludo, queridos *samiđeanos*, hermanos y hermanas de la humana familia de todo el mundo, que habéis venido de países próximos y remotos, de los más opuestos reinos del mundo, para estrechar de un modo fraternal recíprocamente vuestras manos en nombre de la gran idea que nos une. Yo os saludo también, glorioso país de Francia y hermosa ciudad de Boulogne-sur-Mer, que gustosamente habéis ofrecido hospedaje a nuestro Congreso. Doy también mis cordiales gracias a aquellas personas e instituciones de París que a mi paso por aquella gloriosa ciudad atestiguaron en mi persona su favor por la causa del Esperanto, nominalmente al señor ministro de Instrucción Pública, al ayuntamiento de París, a la Liga francesa de Instrucción y a muchas y diversas eminencias científicas. (*Aplausos*.)

Santo es para nosotros el día de hoy. Modesta es nuestra reunión; el mundo exterior no tiene gran conocimiento de ella, y las palabras que se dicen en nuestra asamblea no volarán telegráficamente a todas las ciudades y pueblos de la tierra; no son jefes de Estado ni ministros los que se han reunido para cambiar el mapa político del mundo, no brillan en nuestro salón lujosos vestidos ni la multitud de órdenes imponentes, no suenan los cañones alrededor de la modesta casa en que nos encontramos; pero a través

por la orelo, sed sentebraj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la sonoj de io granda kiu nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas: ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugos en la mondon, korpigoj kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos. (*aplaŭdado*, krioj bone! bone! Vivu Zamenhof!)

En la plej malproksima antikveco, kiu jam de longe elviŝiĝis el la memoro de la homaro kaj pri kiu neniam historio konservis al ni eĉ la plej malgrandan dokumenton, la homa familio disiĝis kaj ĝiaj membroj ĉesis kompreni unu la alian. Fratoj, kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havis ĉiuj egalan korpon, egalan spiriton, egalajn kapablojn, egalajn idealojn, egalan Dion en siaj koroj, fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio,—tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj, disiĝis ŝajne por ĉiam en malamikajn grupetojn, kaj inter ili komenciĝis eterna milito. En la daŭro de multaj miljaroj, en la daŭro de la tuta tempo, kiun la homo historio memoras, tiuj fratoj nur eterne bataladis inter si, kaj ĉia interkompreniĝado inter ili estis absolute ne ebla. Profetoj kaj poetoj revadis pri ia tre malproksima nebula tempo, en kiu la homoj denove komencos komprenadi unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion; sed tio ĉi estis nur revo. Oni parolis pri tio, kiel pri ia dolĉa fantazio, sed neniu prenis ĝin serioze, neniu kredis pri ĝi.

Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi. En la malgranda urbon de la franca marbordo kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj, kaj ili renkontas sin reciproke ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu

del aire de nuestro salón vuelan sonidos misteriosos, sonidos muy tenues, imperceptibles al oído, pero perceptibles para toda alma sensible: son los sonidos de algo grande que ahora está naciendo. En el aire se mecen misteriosos fantasmas; los ojos no los ven, pero el alma los siente: son imágenes del tiempo venidero, de un tiempo completamente nuevo. Los fantasmas volarán por el mundo, tomarán cuerpo, se harán poderosos, y nuestros hijos y nuestros nietos los verán, los sentirán y los disfrutarán. (*Aplausos, gritos*: ¡bien!, ¡bien!, ¡viva Zamenhof!)

En la más remota antigüedad, que ya hace mucho tiempo se borró de la memoria de los hombres, y de la cual ninguna historia ha conservado ni el más insignificante documento, la familia humana se dispersó y sus miembros dejaron de entenderse mutuamente. Hermanos, creados todos según un modelo, hermanos, que tenían todos igual cuerpo, igual espíritu, iguales capacidades, los mismos ideales, el mismo Dios en sus corazones, hermanos que debían ayudarse entre sí para trabajar unidos en pro de su felicidad y de la gloria de su familia—estos hermanos se hicieron extraños unos á otros, se separaron al parecer para siempre en agrupaciones enemigas, y dió principio en ellos la eterna lucha. En el transcurso de muchos millares de años, en la duración de todo el tiempo, que recuerda la historia de la humanidad, estos hermanos no hicieron más que luchar entre sí, y toda inteligencia entre ellos fué absolutamente imposible. Profetas y poetas soñaron en un remotísimo y nebuloso tiempo, en que los hombres de nuevo comenzarían á comprenderse uno á otro y de nuevo se unirían en una sola familia; pero esto no era más que un sueño. Se hablaba de ello como de una dulce fantasía, mas nadie lo tomó en serio, nadie creía en ello.

Y ahora, por vez primera, el sueño de miles de años empieza á realizarse. En una pequeña ciudad de la playa francesa se han reunido hombres de los más diversos países y naciones y se encuentran recíprocamente no como mudos y sordos,

alian, ili parolas unu kun la alia kiel frat-
toj, kiel membroj de unu nacio. Ofte
kunvenas personoj de malsamaj nacioj
kaj komprenas unu alian; sed kia gran-
dega diferenco estas inter *ilia* reciproka
komprenigado kaj la *nia*! *Tie* komprenas
sin reciproke nur tre malgranda parto da
kunvenintoj, kiuj havis la eblon dediĉi
multegon da tempo kaj mono, por lerni
fremdajn lingvojn,—ĉiujn aliaj partopre-
nas en la kunveno nur per sia korpo, ne
per sia kapo; sed en *nia* kunveno reci-
proke sin komprenas *ĉiuj* partoprenantoj,
nin facile komprenas ĉiu, kiu nur *deziras*
nin kompreni, kaj nek malriĉeco, nek
nehavado de tempo fermas al iu la ore-
lojn por niaj paroloj. *Tie* la reciproka
komprenigado estas atingebla per vojo
nenatura, ofenda kaj maljusta, ĉar tie la
membro de unu nacio humiliĝas antaŭ
la membro de alia nacio, parolas *lian*
lingvon, hontigante la sian, balbutas kaj
ruĝiĝas kaj sentas sin ĝenata antaŭ
sia kunparolanto, dum tiu ĉi lasta sentas
sin forta kaj fieraj; en *nia* kunveno ne
ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privi-
legiitaj kaj senprivilegiaj, neniu humili-
ĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj staras sur
fundamento *neŭtrala*, ni ĉiuj estas plene
egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj
de *unu* familio, kaj la unuan fojon en la
homa historio ni, membroj de la plej
malsamaj popoloj, staras unu apud alia
ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj,
sed kiel *fratoj* (*aplaŭdoj*), kiuj, ne altru-
dante unu al alia sian lingvon, kompre-
nas sin reciproke, ne suspektas unu alian
pro mallumo ilin dividanta, amas sin reci-
proke kaj premas al si reciproke la ma-
nojn ne hipokrite, kiel alinaciato al alina-
ciano, sed sincere, kiel homo al homo
(*aplaŭdado*). Ni konsciu bone la tutan
gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ
inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-
Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne
rusoj kun poloj, sed *homoj* kun *homoj*.
Benata estu la tago, kaj grandaj kaj glo-
raj estu ĝiaj sekvoj! (*aplaŭdado*).

sino que se comprenden uno á otro, con-
versan entre sí como hermanos, como
miembros de una misma nación. Reúnense
con frecuencia personas de diferentes
naciones y entiéndense una con otra; pero
qué diferencia tan grande entre su mutua
comprensión y la nuestra! Allí sólo se
entienden una pequeña parte de los re-
unidos que tuvieron la posibilidad de de-
dicar mucho tiempo y mucho dinero al
estudio de lenguas extranjeras—todos los
demás toman parte en la reunión sólo
con el cuerpo, no con la cabeza; mas en
nuestra reunión comprendense recíproca-
mente todos los que toman parte, fá-
cilmente nos entiende todo aquel que
desea entendernos, y ni la pobreza ni la
falta de tiempo cierra á nadie los oídos
para nuestras palabras. Allí la recíproca
inteligencia se consigue de un modo no
natural, sino ofensivo é injusto, pues el
miembro de una nación se humilla ante
el individuo de otra, habla su lengua aver-
gonzando la propia, balbucea y se son-
roja y se siente mortificado en presencia
de su interlocutor, mientras que éste se
siente fuerte y orgulloso; en nuestra
asamblea no existen naciones fuertes y
naciones débiles, privilegiadas y sin pri-
vilegios, nadie se humilla, nadie queda
mortificado, todos estamos firmes sobre
una base neutral, todos poseemos plena-
mente iguales derechos, todos nos senti-
mos miembros de una nación, miembros
de una sola familia, y por primera vez en
la historia de la humanidad, nosotros, in-
dividuos de los más diversos pueblos,
estamos al lado uno de otro, no como
extranjeros, no como rivales, sino como
hermanos (*aplausos*) que, no imponién-
dose uno á otro su lengua, se entienden
recíprocamente, no sospecha uno de otro
por las tinieblas que los dividen, se aman
mutuamente y estréchanse las manos, no
con hipocresía, como lo hace un extran-
jero, sino con sinceridad, como de hom-
bre á hombre. (*Aplausos*.) Penetrémonos
bien de toda la importancia del presente
día, porque hoy, dentro de los hospitala-
rios muros de Boulogne-sur-Mer se han
reunido no franceses con ingleses, no
rusos con polacos, sino hombres con

Ni kunvenis hodiaŭ, por montri al la mondo, per faktoj nerefuteblaj, tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montratos al la mondo, ke reciproka komprenigado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ke la muroj inter la popoloj tute ne estas io necesega kaj eterna, ke reciproka komprenigado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed apero tute natura, kiu pro tre bedaŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj estis nur tre longe prokrastita, sed kiu pli aŭ malpli frue nepre *devis* veni kaj kiu fine nun venis, kiu nun elpaŝas ankoraŭ tre malkuraĝe, sed unu fojon ekirinte, jam ne haltos kaj baldaŭ tiel potencege ekregos en la mondo, ke niaj nepoj eĉ ne volos kredi ke estis iam alie, ke la homoj, la reĝoj de la mondo, longan tempon ne komprenis unu alian! Ĉiu, kiu diras, ke neŭtrala arta lingvo estas ne ebla, venu al ni, kaj li konvertiĝos. Ĉiu, kiu diras, ke la parolaj organoj de ĉiuj popoloj estas malsamaj, ke ĉiu elparolas artan lingvon alie kaj la uzantoj de tia lingvo ne povas kompreni unu alian, venu al ni, kaj, se li estas homo honesta kaj ne volas konscie mensogi, li konfesos, ke li eraris. Li promenadu en la venontaj tagoj en la stratoj de Bulonjo-sur-Marco, li observadu, kiel bonege sin komprenas reciproke la reprezentantoj de la plej diversaj nacioj, li demandu la renkontatajn esperantistojn, kiom multe da tempo aŭ mono ĉiu el ili dediĉis por ellerni la artan lingvon, li komparu tion ĉi kun la grandegaj oferoj, kiujn postulas la lernado de ĉiu lingvo natura,—kaj, se li estas homo honesta, li iru en la mondon kaj ripetadu laŭte: «jes, lingvo arta estas tute ebla, kaj la reciproka komprenigado de homoj per neŭtrala arta lingvo estas ne sole tute ebla, sed eĉ tre kaj tre facila. Estas vero, ke multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ tre malbone kaj malfacile balbutas, ansataŭj paroli flue; sed, komparante ilian

hombres. ¡Bendito sea este día, y sean grandes y gloriosas sus consecuencias! (Aplausos.)

Nos hemos hoy reunido para manifestar al mundo con hechos irrefutables lo que el mundo hasta ahora no ha querido creer. Nosotros haremos ver al mundo que la mutua inteligencia entre personas de diferentes naciones es perfectamente posible, que para esto no es necesario que un pueblo humille y absorba al otro, que las murallas que separan a los pueblos no es una cosa indispensable y eterna, que la mutua comprensión entre criaturas de la misma especie no es un sueño fantástico, sino una aparición enteramente natural que sólo por muy lamentables y vergonzosas circunstancias ha sido por muy largo tiempo aplazada, pero que debía más pronto ó más tarde venir y que por fin ahora ha venido, que al presente aparece todavía con timidez, pero una vez haya comenzado a marchar ya no se detendrá, y con tan gran poder regirá el mundo, que nuestros nietos no han de querer siquiera creer que en ningún tiempo fuese de otra manera, que los hombres, los reyes del mundo, estuviesen durante largo tiempo sin comprenderse uno á otro. Quienquiera que diga que una lengua neutra, artificial, es imposible, que venga á nosotros y se convertirá. Quienquiera que diga que los órganos de la palabra de cada pueblo son diferentes, que cada uno habla la lengua artificial de diferente manera y que los que esta lengua emplean no pueden comprenderse uno á otro, venga á nosotros, y si es hombre honrado, y no quiere mentir á sabiendas, confesará que se equivocó. Pasee en los días sucesivos las calles de Boulogne-sur-Mer y fijese cuán bien se entienden recíprocamente los representantes de las más apartadas naciones, pregunte á los esperantistas que encuentre cuánto tiempo y dinero ha dedicado cada uno de ellos para aprender la lengua artificial, compare esto con los grandísimos sacrificios que exige el aprender cada una de las lenguas naturales—y si es un hombre honrado, irá por el mundo repitiendo muy alto: «Sí, la lengua artifi-

balbutadon kun la perfekte flua parolado de aliaj personoj, ĉiu konsciencia observanto facile rimarkos, ke la kaŭzo de la balbutado kuŝas ne en la lingvo, sed nur en la nesufiĉa ekzerciteco de la diritaj personoj.

Post multaj miljaroj da reciproka surda-muteco kaj batalado, nun en Bulonjo-sur-Maró fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado, kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed irados antaŭen ĉiam pli kaj pli potence, ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperos per ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Boulonjo-sur-Maró, kaj ili estu benataj! (*aplaudado*).

En la unua kongreso de la Esperantistoj estas necese diri kelkajn vortojn pri la ĝisnunaj batalantoj speciale esperantistaj, mi sentas la devon diri ĉi tie kelkajn vortojn pri unu homo, kiu havas tre grandajn meritojn en nia afero kaj al kiu bedaŭrinde la esperantistoj ofte rilatas maljuste nur tial, ĉar li, multe farinte por la ideo de lingvo internacia ĝenerale, ne apartenas tamen al la amikoj de tiu speciala lingva formo, por kiu ni batalas. Mi parolas pri la tre estiminda sinjoro JOHANN MARTIN SCHLEYER, la aŭtoro de Volapük. La lingva formo, por kiu laboris tiu respektata maljunulo, montriĝis ne praktika; la vojo, kiun li elektis ne bona, kaj la afero, por kiu li batalis, baldaŭ falis, kaj per sia falo ĝi alportis grandan malutilon al nia ideo entute kaj precipe al tiu speciale formo de la ideo, por kiu ni batalas. Sed ni devas esti justaj, ni devas taksi ĉiun homon ne laŭ lia venko aŭ malvenko, sed laŭ liaj laboroj. Kaj la laboroj kaj meritoj de sinjoro

cial es posible y la recíproca comprensión de los hombres por medio de una lengua neutra artificial es no solamente posible, sino fácil en sumo grado. Es verdad que muchos de nosotros poseemos muy imperfectamente nuestra lengua, y con dificultad balbuceamos en vez de hablar con fluidez; mas comparando este balbuceo con la perfectamente flúida conversación de otras personas, un observador concienzudo fácilmente notará que la causa del balbuceo estriba no en la lengua, sino exclusivamente en el ejercicio insuficiente de las citadas personas.

Después de miles de años de recíproca sordomudez y de incesante lucha, ahora en Boulogne-sur-Mer de hecho se da principio, en la más amplia medida, á la mutua comprensión y confraternidad entre los individuos de las distintas naciones de la humanidad; y una vez ha comenzado, ya no se detendrá, sino que seguirá siempre adelante cada vez con mayor poder; hasta las últimas sombras de la eterna obscuridad desaparecerán para siempre. Importantísimos son los presentes días en Boulogne-sur-Mer, y benditos sean. (*Aplausos*.)

En el primer congreso de los esperantistas, preciso es decir algunas palabras sobre los combatientes por nuestra causa hasta la hora presente. Mas antes de hablar sobre los luchadores, especialmente esperantistas, me creo en el deber de dirigir aquí algunas frases á un hombre que tiene muy grandes méritos en nuestra causa, y al cual desgraciadamente aluden con frecuencia los esperantistas injustamente sólo porque habiendo hecho mucho por la idea de la lengua internacional en general, no pertenece, sin embargo, á los amigos de esta especial forma de lengua por la cual nosotros luchamos. Hablo del muy digno de estimación Sr. D. JUAN MARTÍN SCHLEYER, autor del Volapük. La forma de lengua por la cual ha trabajado este respetado anciano resultó impracticable, el camino que eligió no parecía bueno, y la causa por que luchó, vino pronto á tierra, y con su caída trajo mucho perjuicio á nuestra idea en su totalidad y en la forma espe-

SCHLEYER estis *tre grandaj*. Kun granda fervoro li laboris por la ideo de lingvo internacia en la daŭro de multaj jaroj; dum multaj personoj donadis nur nudajn *projektojn*, li estis la nua, kiu havis sufiĉe da pacienco, por ellabori plenan lingvon de la komenco ĝis la fino (kvankam Esperanto tiam estis jam preta, ĝi ne estis ankoraŭ publikigita), kaj ĝi ne estas lia kulpo, se la lingvo montriĝis ne praktika. Li estis la unua, kiu per senlaca laborado vekis la intereson de la mondo por la ideo de lingvo neŭtrala, kaj ĝi ne estas lia kulpo, se lia falinta afero por longa tempo malvarmigis la mondon por ĉia arta lingvo. Li volis fari grandan bonon, kaj por la atingo de tiu bono li laboris tre multe kaj fervore, kaj ni devas lin taksi ne laŭ lia sukceso, sed laŭ lia volo kaj laboro. Se la ideo de lingvo internacia iam venkos la mondon—tute egale, ĉu ĝi estos sub la formo de Esperanto aŭ de ia alia lingvo—la nomo de SCHLEYER okupos ĉiam la plej honoran lokon en la historio de nia ideo, kaj tiun ĉi nomon la mondo neniam forgesos. Mi esperas, ke mi esprimos la opinion de ĉiuj partoprenantoj en nia kongreso, se mi diros: «ni esprimas nian koran dankon al sinjoro SCHLEYER, la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia!» (*aplaŭdado*).

Nun mi transiros al la laborantoj speciale esperantistaj. Ne venis ankoraŭ la tempo skribi oficialan historion de nia afero, kaj mi timas, ke mi povus fari ian publikan maljustaĵon al tiu aŭ alia persono ĉe la kompara taksado de la meritoj de la diversaj batalantoj. Tial mi ne nomos ĉiun el ili aparte, sed al ĉiuj kune mi esprimas koran dankon pri ilia laborado en la nomo de ĉiuj amikoj de Esperanto (*aplaŭdado*). Dek ok jaroj pasis de la tago, kiam Esperanto aperis en la mondon. Ne facilaj estis ĉi tiuj dek ok

cial por la que nosotros hacemos nuestra campaña. Pero debemos ser justos y juzgar á los hombres no según su victoria ó su derrota, sino según sus trabajos. Y los trabajos y méritos del SR. SCHLEYER son importantísimos. Con gran fervor trabajó por la idea de la lengua internacional en el transcurso de muchos años; mientras otras personas daban solamente meros proyectos, él fué el primero que tuvo suficiente paciencia para elaborar una lengua completa desde el principio hasta el fin (aunque el Esperanto estaba ya á la sazón á punto, todavía no se había publicado), y no es culpa suya si la lengua se manifestó impracticable. El fué el primero que con su trabajo incansable despertó el interés del mundo por la idea de una lengua neutral, y no suya la culpa de que su causa cayendo enfriase por largo tiempo al mundo para toda lengua artificial. Quiso hacer un gran bien, y para la consecución de este bien trabajó muchísimo y con mucho fervor, y nosotros no debemos calificarle por su éxito, sino por su voluntad y su trabajo. Sí, la idea de lengua internacional vencerá ya al mundo—es lo mismo que sea bajo la forma de Esperanto ó de cualquier otra lengua,—el nombre de SCHLEYER ocupará siempre el lugar más honroso en la historia de nuestra idea, y este nombre nunca jamás el mundo ha de olvidar. Yo creo expresar la opinión de todos los que toman parte en nuestro congreso, si digo: «Damos nuestras más cordiales gracias al SEÑOR SCHLEYER, el primero y más enérgico campeón de la idea de lengua neutra internacional.» (*Aplausos*.)

Ahora pasaré á los campeones especialmente esperantistas. Todavía no ha llegado el tiempo de escribir la historia oficial de nuestra causa, y temo que pueda cometer alguna injusticia con esta ó en aquella persona, en el juicio comparativo de los méritos de los diversos campeones. Por eso no nombraré á nadie aparte, sino que á todos expreso mi cordial agradecimiento por su empeñado trabajo, en nombre de todos los amigos del Esperanto. (*Aplausos*.) Diez y ocho años han pasado desde el día en que el Esperanto

jaroj. Nun mi vidas antaŭ mi grandegan nombron da varmegaj amikoj de Esperanto, kiuj reprezentas per si preskaŭ ĉiujn landojn de la tera globo, preskaŭ ĉiujn naciojn de la mondo, ĉiujn rangojn, statojn kaj klasojn de la homoj. Tre granda kaj vasta estas jam nia literaturo, tre multaj estas niaj gazetoj, en la tuta mondo ni havas nun grupojn kaj klubojn esperantistajn, kaj al neniu klera homo en la mondo la nomo de nia afero nun estas jam nekonata. Kiam mi rigardas la nunan brilantan staton de nia afero, mi rememoras kortuŝite pri la unuaj pioniroj, kiuj laboris por nia afero en tiu malĝoja tempo, kiam ni ĉie renkontadis ankoraŭ nur mokon kaj persekuton. Multaj el ili vivas ankoraŭ kaj ĉi rigardas nun kun ĝojo la fruktojn de sia laborado. Sed ~~16~~ ve, multaj el niaj pioniroj jam ne vivas. Dek ok jaroj estas granda peco da tempo. En tiu ĉi granda spaco da tempo la morto rabis al ni tre multe el niaj fervoraj kunbatalantoj. Citi ĉiujn nomojn estus nun afero ne ebla; mi nomos nur kelkajn el ili. La plej frue forlasis nin LEOPOLDO EINSTEIN, (*aplaŭdado*) la unua energia propagandisto de nia afero; lia morto estis granda bato por nia afero entute, kaj speciale por ĝia disvastigado en Germanujo. Poste la morto rabis al ni JOSEFON WASNIEWSKI, (*aplaŭdado*) la simpatian kaj de ĉiuj amatan apostolon de nia afero en Polujo. Kaj antaŭ kelke da jaroj mortis tiu persono, al kiu Esperanto ŝuldas multe, tre multe kaj sen kiu nia afero nun eble tute ne ekzistus: mi parolas pri la neforgesecbla W. H. TROMPETER (*aplaŭdado*). Neniam parolante pri si, postulante por si nenian dankon, li prenis sur siajn ŝultrojn nian tutan aferon, kiam ĝi troviĝis en la plej malfacilaj cirkonstancoj; li sola subtenadis ĝin tiel longe, ĝis la nombro de la esperantistoj fariĝis sufiĉe granda, por subtenadi la aferon per fortoj komunaj. Kiel li ĝojus nun, se li vidus la nunan staton de nia afero!

apareció en el mundo. Dificiles han sido estos diez y ocho años. Al presente veo ante mí un grandísimo número de ardorosos amigos del Esperanto que representan casi todos los países del globo terráqueo, casi todas las naciones del mundo, todas las esferas, todos los estados, todas las clases de la sociedad. Grande y extensa es ya nuestra literatura, numerosos son nuestros periódicos, tenemos en todo el mundo grupos y clubs esperantistas, y á ninguna persona ilustrada del mundo es ya el nombre de nuestra causa desconocido. Cuando yo contemplo el brillante estado presente de nuestra causa, me acuerdo enternecido de los primeros campeones que trabajaron por nuestra causa en aquel tiempo triste en que no encontramos todavía más que burlas y persecución. Muchos de ellos viven aún y contemplan ahora con alegría los frutos de su trabajo. Mas ¡ay! muchos de nuestros compeones han dejado de existir. Diez y ocho años es una buena porción de tiempo. En este gran espacio de tiempo, la muerte nos ha arrebatado á muchos de nuestros fervorosos campeones. Citarlos todos los nombres sería trabajo imposible; solamente nombraré algunos. Quien primero nos dejó fué LEOPOLDO EINSTEIN (*aplausos*), el primer enérgico propagandista de nuestra causa; su muerte fué un golpe grande en toda su extensión, y especialmente para la propaganda en Alemania. Después la muerte nos arrebató á nuestro JOSÉ WASNIEWSKI (*aplausos*), el simpático y de todos querido apóstol de nuestra causa en Polonia. Y hace algunos años murió aquel á quien el Esperanto debe mucho, muchísimo, y sin el cual tal vez el Esperanto no existiera; hablo del inolvidable W. H. TROMPETER (*aplausos*). Nunca hablando de sí mismo, y sin pedir para sí ningún agradecimiento, tomó sobre sus hombros nuestro asunto, cuando se encontraba en las más difíciles circunstancias; él solo lo sostuvo durante largo tiempo, hasta que el número de los esperantistas se hizo suficientemente grande para que pudiera nuestra causa sostenerse con fuerzas comunes. Cuánto disfrutaría él ahora vien-

Krom la nomitaj tri personoj estas ankoraŭ granda, ho ve, tre granda nombro da personoj, kiuj multe laboris por nia afero kaj kiuj nun jam ne loĝas en nia mondo kaj ne povas vidi la fruktojn de siaj laboroj. Ili mortis korpore, sed ili ne mortis en nia memoro. Mi proponas, estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj (*la aŭskultantoj leviĝas*). Al la ombroj de ĉiuj mortintaj batalantoj esperantistaj la unua kongreso esperantista esprimas sian respekton kaj pian saluton! (*longa aplaŭdado*).

Baldaŭ komenciĝos la laboroj de nia Kongreso, dediĉita al vera fratiĝo de la homaro. En tiu ĉi solena momento mia koro estas plena de io nedifinebla kaj mistera kaj mi sentas la deziron faciligi la koron per ia preĝo, turni min al iu plej alta forto kaj alvoki ĝian helpon kaj benon. Sed tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas ia naciano, sed simpla *homo*, tiel same mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur *homo*. Kaj en la nuna momento staras inter miaj animaj okuloj nur tiu alta morala Forto, kiun sentas en sia koro ĉiu homo, kaj al tlu ĉi nekonata Forto mi turnas min kun mia preĝo:

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Al Vi, granda fonto de l'amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de *koro*.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,

do el presente estado de nuestra causa.

Además de las tres personas citadas, hay todavía ¡oh desgracia! una multitud que trabajaron mucho por nuestro asunto y que ahora no están ya en el mundo y no pueden ver los frutos de sus desvelos. Murieron corporalmente, pero no murieron en nuestra memoria. Yo propongo, estimadas señoras y caballeros, que honremos su memoria levantándonos de nuestro asiento (*el auditorio se levanta*). A las sombras de todos los campeones esperantistas que murieron, el primer congreso esperantista expresa su respeto y saludo piadoso. (*Prolongados aplausos*.)

Pronto van á comenzar los trabajos de nuestro congreso, dedicado á la verdadera fraternidad de los hombres. En este solemne momento mi corazón está lleno de algo indefinible y misterioso, y siento el deseo de desahogar mi corazón por medio de alguna plegaria, de dirigirme á la más alta fortaleza é invocar su ayuda y su bendición. Pero del mismo modo que yo en este momento no soy de ninguna nación, sino simplemente hombre, así me creo también que en este momento no pertenezco á ninguna religión, nacional ó parcial, sino que soy meramente hombre. Y en el momento actual está entre los ojos de mi alma sola esa alta fuerza moral que todo hombre siente en su corazón, y á esta desconocida fuerza es á quien yo me dirijo con mi plegaria:

A ti, poderoso misterio incorpóreo
Gran fuerza, que riges el mundo.
A ti, oh gran fuente de amor y verdad
Y fuente de vida constante.
A ti, á quien todos presentan no igual
É igualmente sienten en su corazón.
A ti, ser que creas, á ti que gobiernas
Rogámoste hoy.

A ti, no venimos con credo de un reino,
Con dogmas de ciego fervor,
Ahora se callan disputas de fe,
Hoy rige sólo el credo *interior*.
Con él, que se encuentra igualmente en
(*todos*)
Con él, verdadero, sin fuerza de lucha

Ni staras nun, filoj de l'tuta homaro
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batalale;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l'preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l'granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunigi l'homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj..
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj,
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l'homaro
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen alto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen, senfine!

(*Longa aplaŭdegado krioj:* Vivu Zamenhof, vivu Esperanto!)

Estamos los hijos de la humanidad
Al pie de tu altar.

Y tú la creaste perfecta y hermosa,
Mas ella partióse luchando;
Un pueblo á otro pueblo arremete cruel-
(mente,

Hermanos chacalmente luchan;
Quienquiera que seas, oh Fuerza en misterio,
Escucha las voces de sincera prez,
Devuelve las paces á todos los hijos
De la humanidad.

Juramos trabajo, juramos luchar,
Juntando de nuevo á los hombres;
Sosténnos; no, oh Fuerza, nos dejes caer,
Dejadnos vencer el obstáculo,
Bendice tú misma este nuestro trabajo,
Da tú fortaleza á nuestro fervor,
Que siempre y en contra de ataques sal-
(vajes
Tengamos valor.

La verde bandera muy alta izaremos,
Señal es de bien y hermosura,
La Fuerza del mundo bendecirnos ha
Y conseguiremos el fin;
De entre las naciones rompamos los muros,
Pues ellos crujidos y estruendo darán,
Caer han por siempre y amor verdadero
Habrá acá en el suelo.

Hermanos, unidos, estrechen sus manos...
¡Avancen con armas pacíficas!
Cristianos, hebreos ó mahometanos,
De Dios todos somos los hijos.
Presente tengamos el bien de los hombres,
Y sin detenernos en contra de obstáculos
Al lazo paterno volemós porfiados;
Sin fin avancemos.

(*Prolongadísimos aplausos:* ¡viva Zamenhof! ¡viva el Esperanto!

Traducción del R. P. GUINART, escolapio.

Teksto de la deklaro

de D-ro Zamenhof
akceptita en la Kongreso

I. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn

Texto de la declaración

del Dr. Zamenhof
aceptada en el Congreso

I. El Esperantismo tiene por objeto diseminar en el mundo el uso de una lengua humana neutral, que «no imponiéndose en la vida interna de los pueblos y no proponiéndose de ninguna manera su-

lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj, la eblon komprenigadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure *privata* por kiu la Esperantismo ne respondas.

2. Ĉar en la nuna tempa neniuj esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo *arta*, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj, faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga montriĝis nur unu sola lingvo Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo *Esperanto* kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas «nenies propaĵo», nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaj mastroj de tiu ĉi lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj de tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniuj apar-

plantar las existentes lenguas nacionales», daría á los hombres de distintas naciones la posibilidad de comprenderse entre sí, que podría servir como lengua pacificadora de las instituciones públicas en todos los países donde diversas naciones luchan entre sí por el idioma, y en la que podrían ser publicadas las obras que tienen igual interés para todos los pueblos. Toda otra idea ó esperanza, que tal ó cual esperantista ligue con el Esperantismo, es asunto *privado* suyo del cual el Esperantismo no responde.

2. Porque en la época actual, nadie que haya indagado en todo el mundo duda ya de que la lengua internacional puede ser sólo una lengua *artificial*, y porque de las muchísimas pruebas hechas durante los dos últimos siglos, todos presentan sólo proyectos teóricos, y una lengua efectivamente terminada, por todas partes experimentada, en perfectas condiciones de vida y por todos conceptos la más buena para todo, sólo se ha mostrado una, el Esperanto; por eso los amigos de la idea de una lengua internacional, conscientes de que la controversia teórica no conduce á nada y de que el fin propuesto sólo puede ser logrado por una labor práctica, ya hace tiempo que todos se han agrupado alrededor de la única lengua, el *Esperanto*, y trabajan por su desarrollo y por el enriquecimiento de su literatura.

3. Porque el autor del idioma Esperanto desde el principio rechazó de una vez para siempre todos los derechos personales y privilegios relativos á la lengua, el Esperanto no es «propiedad de nadie» ni moral ni materialmente.

El dueño material de este idioma es todo el mundo, y quien lo desee puede editar en ó para esta lengua todas las obras que desee, y usar la lengua para todos los fines posibles; como dueños morales de este idioma serán siempre tenidas las personas que el mundo esperantista considere como sus compositores mejores y de más talento.

4. El Esperanto no tiene ningún legislador personal y no depende de nin-

ta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute *privatan* kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniu havas la rajton faris ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj «tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto». Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la «Fundamento de Esperanto», ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

gún hombre. Todas las opiniones y obra del creador del Esperanto tienen, como las opiniones y obras de cualquier otro esperantista, un carácter absolutamente *privado* y para nadie obligatorio. El único de una vez para siempre fundamento obligatorio para todos los esperantistas es la obrita «Fundamento de Esperanto», en la cual nadie está autorizado para hacer cambios. Si alguno se aparta de las reglas y modelos dados en dicha obra, nunca podrá sincerarse con las palabras; «así lo desea ó aconseja el autor del Esperanto». Toda idea que no pueda ser expresada con exactitud por el material que se encuentra en el «Fundamento de Esperanto», cualquier esperantista tiene derecho para expresarla de la manera que encuentre más apropiada, del mismo modo que se hace en cualquier otra lengua. Pero para la completa unidad de ella, á todo esperantista está recomendado que imite cuanto le sea posible el estilo que se encuentra en las obras del creador del Esperanto, que es el que más ha trabajado para y en el Esperanto y el que mejor conoce su espíritu.

5. Se llama esperantista toda persona que sabe y usa el idioma Esperanto, cualesquiera que sean los fines para que lo use. La pertenencia á alguna Sociedad esperantista se recomienda á todo esperantista, pero no está obligado á ello.



Sciigoj

Sinjoro Baudoin, prezidanto de la Sens-a grupo, mortis.

Nian kondolencan al lia familio.

Amerikaj Unigitaj Ŝtatoj. — Sinjoro J. A. D. Park, Delaware Ave, Buffalo, N. Y. eldonis poŝtkartojn propagandajn kiuj enhavas, resumon de la esperanta gramatiko. La ideo estas tre bona kaj la kartoj zorge kaj bele faritaj.

Noticias

El Sr. Baudoin, presidente del grupo de Sens, ha fallecido.

Enviamos nuestro pésame á su familia.

Estados Unidos de América.—El señor J. A. D. Park, 510, Dalaware Ave, Búfalo, N. Y., ha editado unas tarjetas postales de propaganda que contienen un resumen de la gramática de Espe-

Francujo.—La dua numero de la ilustrita revuo «Tra la mondo» estas ĉarma. Ni rekomendas al nia legantoj, aboni ĝin.

Sinjoro Conturat komunikis al nia estimata kolego «Esperanto», el Ceret, ke la diskutado ĉe la konferencio rus-japana estis malfacila. Oni parolis kvar lingvojn ruse, france, angle kaj japane, kaj ĉiu ne plene konas la nepatrajn.

Esperanto trudiĝas.

En Vesoul fondiĝis nova grupo.

Sub la titolo «Publika danko», doktoro Zamenhof dankas sur «Lingvo Internacia» ĉiujn, kiuj donis al li pruvon de amikeco en lia ekskurso, okaze je la Boulogne-a Kongreso.

Ankaŭ li sciigos, ke post kelka tempo eliros oficiala raporto pri la Kongreso kaj tie estas montritaj la adresoj per kiuj oni devas sin turni pri ĉio, kio koncernas la «Provizoran Lingvon Komitatton» kaj la «Provizoran Komitatton de Organizado».

Sama gazeto donas al ni la agrablegan sciigon ke SINJORO ZAMENHOF estas ordenita por la KRUCO DE LA HONORA LEGIO. Ni korege gratulas nian karegan doktoron.

Italujo.—«La Sicilia Federacio Esperantista» fondis komercan kontoron sub la titolo «Kontoro Komerca Esperantista». Tiuj tri vortoj montras bonege ĝian celon, kiu ĝi plenumas laŭ niaj sciigoj.

Portugalujo.—«A Defesa», semajna gazeto de Villa Nova de Gaya, publikigis kelkajn lertajn gramatikajn artikolojn pri Esperanto.

Rusujo.—Ni ricevis la du kajerojn numerojn 1^a al 4^a de «Esperanto», grava gazeto redaktita de D-ro Ostrovski, en

ranto. La idea es buena y las tarjetas están hechas cuidadosamente y son bonitas.

Francia.—El segundo número de la revista ilustrada «Tra la mondo» es encantador. Recomendamos a nuestros lectores se abonen a ella.

El Sr. Conturat ha comunicado a nuestro estimado colega «Esperanto», de Ceret, que la discusión en la conferencia ruso-japonesa fué difícil. Se hablaron cuatro lenguas: ruso, francés, inglés y japonés, y nadie conocía plenamente las no patrias.

El Esperanto se impone.

En Vesoul se ha fundado un nuevo grupo.

Bajo el título «Público agradecimiento», el Dr. Zamenhof da gracias en «Lingvo Internacia» a todos los que le han dado pruebas de amistad en su excursión motivada por el Congreso de Boulogne.

También hace saber que pasado algún tiempo publicará una referencia oficial del Congreso, y en ella indicará la manera de proceder respecto a todo lo concerniente al Comité provisional lingüístico y al Comité provisional de organización.

El mismo periódico nos da la agradable noticia de que el Sr. ZAMENHOF ha sido propuesto para la CRUZ DE LA LEGIÓN DE HONOR. Afectuosísimamente felicitamos a nuestro queridísimo doctor.

Italia.—La «Sicilia Federacio Esperantista» fundó un centro comercial bajo el título «Kontoro Komerca Esperantista». Estas tres palabras indican por completo su propósito que consiguen según nuestras noticias.

Portugal.—«A Defesa», semanario de Villa Nova de Gaya, publica varios bien escritos artículos gramaticales referentes al Esperanto.

Rusia.—Hemos recibido los dos cuadernos números 1 al 4 de «Esperanto», importante periódico redactado por el

rusa kaj Esperanto lingvoj. Nun oni haltigis la publikigadon, ĉar ĝi devos eldoni en Jalta.

La rusa gazeto Esperanto enhavas artikolojn subskribitajn la plej distingindaj esperantistoj kaj liveras novaĵojn trece interesajn por disvastiĝo de nia afero. Sendube la sukceso, kiun certe ricevos la eldonaĵo de D-ro Ostrowski estos tiel granda, kiel estas eksterordinaraj la meritoj de tiu konita esperantisto, kiu de la unuaj momentoj kunhelpis per sia aktiveco kaj oferemo al propagando de Esperanto.

Kosto de la jarabono estas 8 frankoj kaj oni povas ĝin sendi al D-ro Ostrowski.

Salvador. — S-ro Ricardo Goyzueta Abrill, kiu nun loĝas en Guatemalo, klopodis en San Salvador krei esperantan Societon por propagando de Esperanto. Kvankam li ne sukcesis nun, li jetis la semon kaj pli malpli frue ĝi fruktodonos.

Svisujo. — Laŭ nia kara kolego «Svisa Espero», oni fondis grupon en Nyon-o kaj ĉie oni klopodas por nia simpatia afero.

Hispanujo. — De antaŭlonge sin montras la fervoro de la Murciaj esperantistoj en la tiea ĵurnalaro. S-ro Benavente presigas preskaŭ ĉiusemajne en la revuo titolita «Murcia» interesajn kaj spritajn artikolojn por la propagando, kaj la lastajn tagojn «El Liberal de Murcia» eldonis pravan respondon al la verkaĵo de S-ro Bonafoux en kiu oni elpruvis ke li tute nekonas nian aferon... S-ro Martí en «La Región de Levante» rememorigas ofte, ke Esperanto ekzistas, kaj precipedevas esti kalkulata inter la ĵurnalaro esperantista «La Verdad». ĉar de sia kreo, antaŭ tri jaroj, presigis centon da artikoloj, notoj kaj sciigoj rilatantaj al nia entrepreno, kaj ja estas la ĵurnalo hispana, kiu pli longedaŭre kaj senhalte bataladis. Nur dum la aŭgusta monato ĝi presigis kvin esperantistajn korespondadojn, unu rilate al la «Presa Esperantista

Dr. Ostrowski en los idiomas ruso y Esperanto. Ahora se ha suspendido la publicación porque debe hacerse en Jalta.

La revista rusa «Esperanto» contiene artículos firmados por los más distinguidos esperantistas y presenta noticias de sumo interés para la definición de nuestra causa. Sin duda, el éxito que espera á la publicación del Dr. Ostrowski es tan grande, como excepcionales son los méritos de este conocido esperantista, que desde los primeros momentos contribuyó con su actividad y sacrificio á la propaganda del Esperanto.

El importe de la suscripción anual es de 8 francos y puede remitirse al doctor Ostrowski.

Salvador. — El Sr. D. Ricardo Goyzueta Abrill, que ahora reside en Guatemala, trabajó en San Salvador por crear una Sociedad para la propaganda del Esperanto. Aunque no ha conseguido ahora su deseo ha arrojado la semilla y más ó menos pronto fructificará.

Suiza. — Según nuestro querido colega «Svisa Espero», se ha fundado un grupo en Nyon, y por todas partes se trabaja por nuestro simpático asunto,

España. — El fervor de los esperantistas murcianos se viene revelando de antiguo en la prensa de la localidad. El Sr. Benavente publica casi todas las semanas en el semanario «Murcia»; interesantes artículos de propaganda, y últimamente la ha insertado en «El Liberal» de Murcia atinadísima respuesta al escrito en que el Sr. Bonafoux demuestra desconocimiento completo de la cuestión. El Sr. Martí, en «La Región de Levante», recuerda con frecuencia que existe el Esperanto, y sobre todos, hay que considerar como periódico esperantista «La Verdad», que desde su fundación, hace tres años, lleva publicados un centenar de artículos, sueltos y noticias relativas á nuestra causa, siendo sin duda el periódico español que ha hecho más larga y sostenida campaña. Sólo en el mes de Agosto ha dado á luz cinco correspon-

Societo», alia pri interesa interparolado de ĝia korespondanto kun D-ro Zamenhof, kaj tri de la sama, pri la kongreso de Boulogno-sur-Mar.

Laŭ nia estimata Alikante-a revuo «Museo Exposición» kiu kiel ĉiam bonege rilatas al Esperanto, S-ro Elizaicin intencas la tian kreon de grupo esperantista, kaj pro tio klopodas. Antaŭen!, kara amiko.

S-ro Sánchez Esteban daŭrigas siajn bonegajn esperantajn artikolojn en «El Castellano» el Burgos.

«La Correspondencia de España» publikigis bonegan kaj longan artikolon propagandan de S-ro Javier G. Rodrigo el Barcelono.

La semajna Madrid-a gazeto «Los Sucesos» (La Okazintaĵoj) publikigas fervoran artikolon pri Esperanto kaj portreton de D-ro Zamenhof.

S-ro M. Bru incitis en la ĵurnalo «La Vanguardia» el Barcelono, al iu esperantisto kiu volos konigi lin pri Esperanto, kaj en sama gazeto S-ro J. Bramon lerte respondas en tri bonegaj gramatikaj artikoloj.

Al ĉiuj, sen escepto de S-ro Bonafoux, dankegojn. Tiu ĉi sinjoro kaj ceteraj hispanaj malamikoj de Esperanto bonege helpas al ni, iel li parolas pri nia afero, kiel same okazis antaŭ dek jaroj je aliaj mokantoj en la landoj kie hodiaŭ oni plene konas Esperanton.

dencias esperantistas, una relativa á la «Presa Esperantista Societo», otra á una interesante entrevista de su corresponsal con el Dr. Zamenhof y tres del mismo relativas al Congreso de Boulogne-sur-Mer.

Según nuestra estimada revista de Alicante, «Museo Exposición», que como siempre se refiere con suma bondad al Esperanto, el Sr. Elizaicin intenta la creación allí de un grupo esperantista y para ello trabaja, ¡adelante!, querido amigo.

El Sr. Sánchez Esteban continúa sus magníficos artículos de Esperanto en «El Castellano» de Burgos.

«La Correspondencia de España» ha publicado un magnífico y largo artículo de propaganda del Sr. Javier G. Rodrigo, de Barcelona.

El semanario madrileño «Los Sucesos» publica un favorable artículo referente al Esperanto, y el retrato del doctor Zamenhof.

El Sr. M. Brú incitó en el periódico «La Vanguardia», de Barcelona, á cualquier esperantista que quisiera darle á conocer el Esperanto, y en el mismo periódico el Sr. D. J. Bramón discretamente le contesta en tres magníficos artículos gramaticales.

A todos, sin excepción del Sr. Bonafoux, muchísimas gracias. Este señor y los demás españoles enemigos del Esperanto nos ayudan grandemente de cualquier modo que hablen de nuestro asunto, lo mismo que ocurría hace diez años con otros burlones en los países donde hoy se conoce completamente el Esperanto.

Popolaj proverboj

Nur vi laŭdos kaj mallaŭdos post sep tutaj jaroj.

Baptopatrino mia, mi ja ĝin sciis tiam!

Perdon neniu bedaŭras de amiko pruntanta kaj tranĉil'ne tranĉanta.

Malnovaj, amiko, lardo kaj vino.

Refranes populares

No alabes y desalabes hasta siete navidades.

¡Ay, mi madrina!, ¡que eso ya entonces me lo sabía!

El amigo que no presta y el cuchillo que no corta, que se pierdan poco importa.

Amigo viejo, tocino y vino añejos.

Pri cindro ŝparema, pri faruno disdonema.

Io malpropra ne estas heredota.

La tajloro de l' kampeto, kudradis senpage kaj donadis la fadenon.

Akvo neniam malsanigas, nek malriĉigas nek ebriiigas.

Pluvo dum la sankta Johano (la 24^{an} de Junio) forprenas vinon kaj ne donas panon.

Akvo post la figo, kaj post la piro... vino!

Esperantigis R. CODORNIU.

Allegador de la ceniza y expendedor de la harina.

Algo ajeno no hace heredero.

El sastre del campillo, que cosía de balde y ponía el hilo.

Agua no enferma, ni embeoda ni adeuda.

Agua por San Juan quita vino y no da pan.

¡Agua al higo y á la pera... vino!

NIAJ VIZITANTOJ

N.º 12, 1904, kaj 13, 1905.—**Internacia Scienca Revuo.** 27, boulevard Arago *Parizo*, (*Franĉujo*). Jarabono; 7 fr.

N.º 20, 1905.—**Espero Katolika.** A Sainte Radegonde près *Tours* (*Indre et-Loire, Franĉujo*). Jarabono, 2,50 fr.

N.º 24, 1905.—**The Esperantist.** 67, Kenington Gardens Square, W., *London*. Jarabono, 4 fr.

N.º 9 kaj 10, 1905.—**The British Esperantist.** 13, Arundel street, Strand, W. Q. *Londono*. Jarabono, 2 frankoj.

N.º 25.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, *Lima* (*Peruo*). Jarabono, 3 frankoj.

N.º 2 kaj 3, III jaro, 1905.—**Juna Esperantisto.** 9, avenue des Vollandes, *Genevo* (*Svisujo*). Jarabono, 2 fr.

N.º 126 kaj 127, 1905.—**Museo Exposición.** Medina, 37, *Alicante*. Jarabono, 5 pesetoj.

Maj-Jun. 1905.—**La Meksika Lumturo.** *Sta. Rosa, Necoxtla, Veracruz* (*Meksikujo*). Jarabono, 3 fr.

N.º 6, 7, 8 kaj 9, 1905.—**Svisa Espero.** 6, vieux College, *Genève* (*Svisujo*). Jarabono, 2,50 frankoj.

N.º 8-9, 2.^a jaro, 1905.—**Germana Esperantisto.** Prinzentrasse, 95, *Berlin S.* (*Germanujo*). Jarabono 3 markoj.

N.º 11.—**La Alĝera Stelo.** 57, rue d'Isly, *Alĝer* (*Alĝerujo*). Jarabono, 3 fr.

N.º 103.—**Revista del Ateneo Obrero Manresano.** Borne, 13, Manresa. Senpage al la protektantoj. Unu numero, 0,10 pesetoj.

N.º 79, 82 kaj 84.—**La Revue de l'Esperanto en Le Cicerone.** 102, rue de la Paix, *Boulogne sur-mer* (*Franĉujo*). Jarabono, 10 fr.

N.º 10.954.—**La France du Nord.** 37, rue Thiers, *Boulogne-s-m* (*Franĉujo*). Jarabono, 28 fr.

N.º 3.—**Espero de Katalunjo.** Presejo Lamiot, *Ceret* (*Franĉujo*). 0,05 numero.

N. 124, 125 kaj 126.—**Lingvo Internacia.** 33, rue Lapepède. *Paris*. Jarabono, 5 frankoj. Kun literatura aldono 7 fr. 50.

N.º 1 kaj 2.—**Ruslanda Esperantisto.** S. Petersburgo, Bolš. Podjaĉeskaja, 24. *Rusujo*. unu numero 30 kopekojn.

N.º 4.—**Gefrataro Esperanta.** Napolo, Largo Gesu e Mario, n.º 4. *Italujo*. Jarabono, 4 fr.

N.º 7.—**Esperanto.** 71, Michelet, Le Havre, *Franĉujo*. 24 numeroj sinsekvaj, 3 frankoj.

N.º 36.—**La Belga Sonorilo.** 31, rue des Patriotes, Bruxelles, *Belgujo*. Jarabono, 3 fr.

N.º 2.—**Espero Pacifista.** 16, Avenue de la Grand-Armée, Paris, 17ª. Jarabono, 4 frankoj.

N. 3, II jaro.—**Holanda Pioniro.** *Hilversum, Holando*. Jarabono, 3 fr.

N.º 2.—**Tra la Mondo.** 15, Boulevard des deux Gares, *Mendon* (S. et O.). *Franco* Jarabono, 8 fr.

N.º 1, 2, 3 kaj 4.—**Esperanto.** *Falta (Rnsujo)*. Jarabono, 8 fr.

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

HISPANA JARLIBRO ESPERANTISTA enhavanta la regularon de Hispana Societo por propagando Esperanto, la protokolojn de la kunsidoj okazintaj dum la jaro 1904, la nomaron de ĉiuj hispanaj esperantistoj kaj iliajn nunajn adresojn—0,25 pesetoj kun poŝtkosto kaj 0,55 se oni dezirus ĝin ricevi pt—rekomenditan. Faru la mendojn ĉe la Administrado de LA SUNO HISPANA aŭ al S-ro Manuel Benavente, Sociedad, 14, Murcia (Hispanujo). La membroj de H. S. p. p. E. ricevos ĝin senpage kontraŭ la sendo de ilia kotizaĵo por 1905.

Sociedad Española para la propagación del Esperanto.—*Presidente*, D. Ricardo Codorniu, Ingeniero Jefe de Montes. Paseo del Malecón, C, Murcia.—*Secretario*: Reverendo P. Antonio Guinart, Escuelas Pías, Valencia.—Cuota anual: 1 peseta.—*Informes al Secretario*.

EL BIBLIOTECARIO DEL GRUPO ESPERANTISTA DE MURCIA—Sociedad, 14—Se encarga de hacer la suscripción á cualquiera revista de Esperanto, de las que se publican en la actualidad y de proporcionar cualquiera de las obras de Esperanto.

Diccionario esperanto español de raíces, una peseta; Gramática, 0,75; cuadro de palabras correlativas, 0,05; enumeración y significado de los afixos, 0,20; ejercicio de traducción, 0,50.—RVDO. P. ANTONIO GUINART—ESCUELAS PÍAS—VALENCIA.

L' Esperantiste oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de esperanto, 20 paĝoj (formato 15×20) da teksto franca-esperanta kun ok paĝoj de kovrilo, internacia korespondado esperanta, senpage, 3 fr. 50 por unu jaro. 4 fr. kun enskribo en la societeton. Turnu vin al *Administration de «L' Esperantiste»*, Louviers (Eure) France.

ESPERANTO Manual y ejercicios, 3 pesetas.—**Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto**, 6 pesetas. Por INGLADA Y LÓPEZ VILLANUEVA.—En las principales librerías de España y América y en la Secretaría de H. S. p. p. E.—Escuelas Pías—Valencia.

Ni translokis la Administracion de nia gazeto kaj ni petas, oni adresu la korespondadojn, abonojn kaj ĉiujn aferojn, al sinjoro Administranto de «La Suno Hispana»—Avellanas, 11, presejo—Valencia (España).

Hemos trasladado la Administracion de nuestro periódico y rogamos que se dirija la correspondencia, abonos y todos los asuntos, al señor Administrador de «La Suno Hispana»—Avellanas, 11, imprenta—Valencia (España).